De
Reinhard Wolf,
Gersdorf 162,
Germanio.

Al
Feodoro Bartenev,
Moskvo 66,
U. d. S. S. R.

Per Esperanto
Por Socialismo

Gersdorf, la 10an de Novembro 1932.

Kara amiko Feodoro!

Dankon koran por via letero kaj kanto. La „Stalin"-kanto ĝojigis min, kaj ke plaĉis al mi. Kamaradoj komunistaj volis aĉeti ĝin, kaj mi diris, ne vendebla ĝi estas.

---

Konstati mi devas, ke vi skribis en via lasta letero pli perfekte ol antaŭe. Ĉu vi lernis diligente? Treege rapide mi legis kaj tradukis la leteron, la kamaradojn aŭskultantajn kaj scivolemajn mi tiuj povis kontentigi.

---

Bonvolu, ne forgesi, raporti detale pri la festo de la: „Oktobra revolucio". Ni ĉiuj deziras aŭdi ion pri ĝi. Jam viaj vortoj estis interesaj. Al kelkaj kamaradoj, kiuj intencis viziti Moskvo'n okaze de la festo, oni rifuzis la envojaĝon al U.S.S.R. Kial?! Ĉar oni timas, ke ĉi tiuj personoj, klarigos al la popolo germana, ĉefe al ĉi tiuj homoj, kiuj ankoraŭ nun dubas pri Sovetio, kaj kiuj ankoraŭ nun ne estas anoj de la: „K.P.D", la akiraĵojn kaj la konstruadon de U.S.S.R. La vereco venkos. La amaso de la kontraŭsovetuloj ĉiam malgrandiĝas. La kapitalistoj povas fari kion ili volas. La kapitalismo estas bestaĉo tute malsana, kiu espereble mortaĉos baldaŭ. „Frataj al sun', libereco"!

---

Certe interesos vin, aŭdi ion pri la rezultatoj balotaj, de la baloto germana, kiu okazis la 6an de Novembro. Ekzistas 3 ĉefpartioj grandaj:
„1.) La nacisocialista germana laborista partio", gvidanto Hitler, N.S.D.A.P.
„2.) La socialdemokrata partio", gvidanto Severing, S.P.D.
„3.) La komunista partio", gvidanto Thälmann, K.P.D.
Jen la rezultatoj:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1.) N.S.D.A.P. | antaŭ la baloto: | 230 | post la baloto: 195 | 11713785 da anoj |
| 2.) S. P. D. | " " | 133 | " " 121 | 7237894 " " |
| 3.) K. P. D. | " " | 89 | " " 100 | 5974420 " " |

---

Enmetantaj tri bildojn: 1.) Hitler la „mondfama" gvidanto de la N.S.D.A.P. 2.) Ankaŭ Hitler, kiel knabeto tutjuna. La grand-eg-an buŝ-eg-on, kiun li ankoraŭ havas nun, tiun li jam havis kiel knabeto. Kaj per tiu buŝo li trompis siajn anojn.

---

Dum venonta jaro en Moskvo okazos la spartakiado tutmonda. Se prosperos al mi, trovi ĝis tiu tempo ree laboron, mi partoprenos, ne kiel sportulo, sed nur pro tio, ke mi povas vidi Moskvon la urbon sankta. Kompreneble mi ankaŭ intencas viziti vin.

---

Sur via koverton vi gluis belan poŝtmarkon. Bonvolu, afranki viajn leterojn ĉiam per tiaj poŝtmarkoj interesaj. Se ekzistas la ebleco, per pluraj el tiaj poŝtmarkoj. Mi kolektas ilin.

---

Ĉi kune vi trovos leteron de la Gersdorf'aj pioniroj, skribita en germane. Komence la pioniroj intencas skribi germane, sed poste, se ili povos skribi kaj legi Esperanton, ili korespondos esperante. Ĉu vi konsentas?

---

Por ĉi tiun leteron mi ne havas ian interesaĵon, pro tio mi finas kaj salutas vin kaj viaj pioniroj per la saluto de la klaskonsciaj batalantoj

„Ruĝfronto"!

Via amiko

Reinhard Wolf